

**AVENO 15**

Oktobro 1996

## Karaj amikaj verduloj,

mi, kiel sekretario de AVE, salutas vin ĉiujn nome de la partoprenintoj de la AVE-renkontiĝo en Prago (1996-07-22) kaj deziras sukceson en via laboro kaj bonfarton.
Tiu ĉi saluto unue celas al la AVE-anoj, kiuj ne povis ĉeesti kaj krome al la politikistoj de verdaj partioj. Kompreneble ĝi validas ankaŭ por tiuj, kiuj laboras ekster la verdaj partioj favore al ekologio (daŭrigebla evoluo) kaj socio (paca kunvivado inter homoj kaj nacioj).
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE): Membraro > 180 membroj, el tiuj > 40 virinoj; en Afriko (3 membroj / el 3 landoj), Ameriko (10/ 4), Azio (7/ 4), Aŭstralio (3), Eŭropo (159/ 24).

**Partneroj** (E-o): UEA (Faka Asocio), SAT, Vegetaranoj, Nefumantoj. En aliaj lingvoj al diversaj NRO-oj (pri Bering-Maro, Malarmado); politikaj kontaktoj: Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj, Frakcio de Verduloj en la Eŭropa Parlamento, diversaj Verdaj Partioj.
**Financoj** de AVE: Elkoran dankon por kelkaj mondonacoj al nia UEA-konto avex-z aŭ rekte por la ĵurnaloj SATEB (laboristoj) kaj Asistilo (religioj). La statuso de faka asocio ĉe UEA kaj la salono (2 h) kostis 97 kaj 120 nlg; krome produkti kaj dissendi AVENO-n. Senkoste mi jam sendas AVENO-n al AVE-anoj kiuj havas elektronikan adreson. Eble vi ricevos tiun ĉi AVENO-n el Krakovo, de elsendejo de *Andrzej*. Regulan kotizon ni ne enkondukos, se eblas. Do, vi povus donaci 10 nlg por avex-z ĉe UEA aŭ pere de monbiletoj aŭ irkoj. Mi antaŭdankas elkore. Se iam venos pli da mono ol bezonata ni decidos komune.

### Estontaj renkontiĝoj de AVE-anoj:

**Eŭropa AVE'97**, 97-05-17, okaze de la Eŭrop-Unia Kongreso de Esperantistoj en Stuttgart.
**Tutmonda AVE'97**, ĉ. 97-07-26, okaze de la UK en Adelajde - mi (sekr.) ne partoprenos tie - mi petas AVE-anojn kiuj intencas partopreni en Adelajde kontakti min. AVE mendos salonon (2 horojn) se iu pretas gvidi la sesion aŭ pretas deĵori en la faka budo por montri AVE-n al la publiko.
**Eŭro-Azian Kongreson**, 97-08-09/17, en Ekaterinburg (Rusio, Uralo); mi intencas partopreni. Bonvolu kontakti min, se vi ankaŭ intencas.
**Tutmonda AVE'98**, ĉ. 98-07-26, okaze de la UK en Montpellier; okazos Verda Seminario de AVE supozeble antaŭ la UK en la apuda pejzaĝo (Larsac).

### 81-a UK en Prago:

Unue ni uzis la novan eblecon, kion disponigis la fakdelegito de UEA, *Amri Wandel*, nome senpagan budon por informi la esperantistan publikon pri AVE. Tio tre utilis; parttempe uzis ĝin tri diversaj fakoj.

### Raporto el la AVE-renkontiĝo en Prago '96

29 partoprenantoj el Ameriko kaj Eŭropo ĉeestis je la renkontiĝo de AVE, kio okazis lunde posttagmeze (1996-07-22). Komencis per raporto de la sekretario pri la agado enkadre de Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj (EFVP) kun kiu AVE havas bonan kontakton. Tamen montriĝis je interparoladoj en Vieno, okaze de la 1-a kongreso de la EFVP (bv-u vidi sube) kie AVE havis inform-standon, ke la scio pri Esperanto ne estas sufiĉe ampleksa.
La AVE-anoj intencas plidaŭrigi la sistemon de salutleteroj al verdaj politikistoj en iliaj gepatraj lingvoj.
La interkonatiĝo de la AVE-anoj bone montris la diversecon kaj same la unuecon de la verda movado ene de la esperantistoj.
Informo estis pri la daŭra katastrofo, kiu regas en la regiono ĉirkaŭ la **Aral-maro** pro la neracia depreno de akvo el la du alfluantaj riveroj por akvumi koton-kampojn kaj same neracia uzado de agrikulturaj kemiaĵoj. *Murodkul Rozikov*, kiu ĉijare ne povis ĉeesti, sendis valorajn informilojn pri la nuna agadplano de UN-evoluprogramo (UNDP).
Alia kriza regiono estas la rusaj **Aleuto-Insuloj**. Tri virinoj fondis AMIQ-instituton por helpi al daŭrigebla evoluo en tiu ĉi regiono. Alimaniere estus perdo de la biodiverseco, sur la insuloj kaj en la ĉirkaŭanta Bering-maro pro tro-fiŝado kaj ĉasado de mar-mamuloj.
Agadpunkto de AVE estas la **Bestaj Rajtoj**, kiun prezentis *Anita Altherr*. Ĝi ampleksas de loka iniciativo ĝis eŭropa nivelo, ekz-e kontraŭ taŭro-batalo, ĉasado de migrantaj birdoj kaj plurtaga transporto de buĉotaj bestoj. *Norina Cijan* petis nin protesti kontraŭ la birdokaptado (i.a. kantantaj birdoj) je la Konsilaro de la Regione Friuli Venezia Giulia, Piazza Oberdan 6, It-34100 Trieste (Italio). (Bv. skribi tien kaj noti la alvokon de *Ute Haas* - kiu celas al enkonduko de Bestaj Rajtoj en la Mastriĥtaj Traktatoj (-> je fino).
La subskribojn de partoprenantoj de la 80-a UK en Tampere por mondvasta malpermeso de grund-minoj (eksplodiloj kontraŭ homoj kaj bestoj) estis senditaj al koncerna adreso de UN-oficejo en Genevo.
Bedaŭrinde la ŝtatestroj nur malpermesis la senmetalajn minojn. Nun necesas nova strategio. Ekz-e interparoloj de akci-posedantoj je Daimler-Benz, kiu krom aŭtomobiloj (Mercedes) ankaŭ produktas minojn kontraŭ tankoj. AVE subtenas tiun ĉi agadon de RIB (Armad-oficejo, Germanio) kaj de pluraj aliaj iniciativoj. (bv. vidi sube)
Pri tute alia afero temis rilate la konkurenco por AVE pere de la nova asocio TADEN (**nefumantoj** esperantistaj). Ni ricevis bultenon de tiu ĉi nova organizo "Puraj Pulmoj", kiu enhavas sciencajn kaj privatajn informojn kaj alternativojn (ekz-e konversio de tabak--kultivado al oleosemoj). Adr-o: Georgo RADA, Rybalkova 1029, BL.645, CZ-43401 MOST. Kompreneble AVE ankaŭ estas kontraŭ la poluo de la aero. Mi eĉ ne miras, ke TADEN devenas de norda bohemio, kie la poluo de la aero pro bruligo de bruna karbo kaŭzis pulmo-malsanon kaj arbar-mortadon en la Erc-montaro. Tie troviĝas arbaro konsistanta el trunkoj. Se oni devas bruligi tiun ĉi karbon, tiam necesas uzi pli

bonaj filtrilojn kaj lavadon de la fumgasoj. Pluraj AVE-anoj dubis, ĉu tiu ĉi nova asocio vere necesas, ĉar tiamaniere niaj fortoj estas disigataj. Tamen, ĉiu havas la rajton fondi asocion. La AVE-anoj sentis la neceson plifortigi la varbadon por plibonigo de la aero. Nuntempe estas aktuala temo en pluraj landoj, kie fumantoj rajtas fumi.
**Memrespondeco** estis plurfoje admonita; ne nur sufiĉas respondece agi mem - ankaŭ en la politikan sferon ni devas enmeti niajn proponojn. Post vigla diskuto de tiuj temoj sekvis diversaj informoj:
*Lev Medvedev* pri sia projekto Etno kaj Kulturo (pr. Mira 196-44, 129128 Moskvo; soceco@glas.apc.org
*Tatjana Auderskaja* el Odesso invitis 1-e por internacia (E-o) infan-junulara naturprotekta tendaro kaj 2-e pri ekologiaj ekskursoj al la natura rezervejo "Delto de la Dnestro". Ŝia adreso: ul. Korolenko 5-B, kv.26, UA-270100 Odessa; loz@loz.intes.odessa.ua
*August Kilk* pri sia internacia Spirita Centro Amo (ĉefajn valorojn de homa vivo, unueco de la religioj, naturproksima vivmaniero kaj perfektigo de tuthoma personeco) enkadre de feria seminario: Str. MERE 83-3, EE-2126 VOSU (Estonio), tel.: 232-99114
Planita estis **AVE-seminario'98** pri verda politiko kaj sperto de naturo. Bedaŭrinde la invito de *H. Marinov* al Bulgario ne estis akceptita, anstataŭ tio ni nun planas je Larzac, apud Montpellier, kie estos la 83-a UK ('98). *Ges-oj Sion* pretis organizi la lokon.
Ĉu AVE-anoj renkontiĝos oficiale en **Adelajde'97** (82-a UK) ankoraŭ estas necerta; ĉar neniu de la ĉeestantoj povis garantii partoprenon. Mi petas AVE--anojn, kiuj intencas veturi tien, kontakti la AVE-sekretarion. Dankon al *Terry Manley*, 67 Cobran Rd., Cheltenham, NSW 2119 (Aŭstralio); li pretas helpi "surloke", kvankam li certe ne havos multe da tempo. La eŭropa **AVE-renkontiĝo'97** okazos enkadre de la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart (97-05-17).

## Politiko / Balotoj (nekompleta):

Eks-Jugoslavio: Dank' al la penoj de UN kaj Usono kaj espereble ankaŭ de eŭropaj politikistoj finfine la disdivido de la tereno estas haltigita. La kontrakto de Dayton nur povis fiksi la frakciigon - almenaŭ preventis pliajn kruelaĵojn. Nun komencas la rekonstruado de domoj kaj de fidoj. Montriĝis, ke EU kaj OSKE bezonos plurajn jarojn por ludi gravan kaj pacigan rolon almenaŭ en Eŭropo mem. Ni jam estas feliĉaj, ke militoj inter la membroj de EU ne plu okazis.
Slovakio nun komencas redukti la politikan liberon. Temas pri tre strikta kontrolo de financoj, kion Ne-Registaraj Organizoj (NRO) povus ricevi - ekz-e de Open Society Funds (Fonduso por malferma socio) de Georgo Soros. Se vi havas personajn kontaktojn en Slovakio bv. pridemandi pri tio. Necesas publikeco. Publika opinio pri Slovakaj Verduloj: 5.1% (1996).
Belarusio: NRO-j ankaŭ ne havas sufiĉajn civilajn rajtojn tie.
En Malalt-Saksujo en Germanio la Verduloj ricevis 9% averaĝe je balotado por lokaj kaj regionaj konsilioj.
"Ralph Nader for President": La Kaliforniaj Verduloj helpas al Ralph Nader kandidatiĝi por la prezidenteco de Usono. Li ne estas membro de la Verda Partio, sed jam dudek jarojn agas por la rajtoj de kosumantoj; kaj pro tio li estas konata tutmonde.

## Raporto el la Verdaj Partioj:

**Internacia renkontiĝo de komunumaj verdaj konsilistoj en Vieno (1996-06-21):**
La renkontiĝo okazis en la urbodomo de Vieno. Estis ekspozicio de verdaj projektoj, rilate al uzado de akvo kaj informaĵoj de la Vienaj Verduloj, ekz-e projekto de civitana oficejo, por inform-interŝanĝo kun la urba administracio pere de la elektronika reto; krome komputor-programo pri simulado kiel efikos eko-impostoj al la ekonomio de Aŭstrio.
Paroladoj estis de *Susi Jerusalem* kaj *Peter Pilz*, la ĉefaj kandidatoj de la Vienaj Verduloj. Gravaj punktoj estis la efikoj de la Maastricht-kontrakto:
- Malmola framo rilate al la ŝtataj ŝuldoj, inkluzive de la landaj kaj komunumaj institucioj. Aŭstrio rajtas havi 3,0% pli da novaj ŝuldoj, sed de tiuj jam 2,7% bezonos la ŝtato mem; tio signifas, ke por la federaciaj landoj kaj la urboj kaj komunumoj restos nur 0,3%.
- Simile kiel en aliaj grandurboj ankaŭ en Vieno ekzistas granda procentaĵo de senlaboreco, ekz-e 25% el la gejunuloj. Laŭ la Verduloj devus esti investoj en ekologie pozitivaj teknikoj.
- Administracioj devas iĝi pli svelta; decidoj devus esti farotaj malpli centralaj; tio gvidus al pli bona uzado de la homaj resursoj kaj pli da ĝojo je la laboro.
- Komuna regiona politiko devus stabiligi la komunumojn; ankaŭ rilate al internaciaj regionoj; ekz-e Vieno, Brno kaj Bratislavo.
- Uzado de Internet aŭ APC-reto (Alternativa kaj Progresiva Komunikado) por interŝanĝi novajn projektojn kaj spertojn.
*Leolucca Orlando*, urbestro de Palermo, parolis pri la fonoj de mafio. Mafieco devenas el malĝusta kompreno de la bazaj kategorioj: familio, amikeco kaj honoro. Mafieco ŝanĝis tiujn valorojn en la negativon. Li volas denove pozitivigi tiujn valorojn kaj kongruan evoluon de la "ambaŭ radoj" en la urbo (administracio same kiel ekonomio kaj kulturo). En Sicilio oni demandas kamparane "al kiu vi apartenas ?". Devus esti pli komuna sento al la tuta komunumo kaj urbo. Kontraŭe al "normala" krimeco, kiu ĉiam laboras kontraŭ la ŝtato kaj jurisdikcio, mafieco ĉiam pendiĝas je ŝtato kaj jurisdikcio. Ĉefan rolon ludas la anonimeco de la bankoj; kiuj funkcias kiel helpanto de la mafio je "lavado de malpura mono". La devizo de Leolucca estas la normaleco; li uzas la bildon "La vivoplenaj okuloj de viva fiŝo". Li ne promesas miraklojn; lia politiko funkcias pere de "malgrandaj paŝoj". La uzadon de lernejoj fare de du diversaj klasoj antaŭtagmeze kaj posttagmeze li ŝtopis. La urbodomo estas malfermita por la popolo - li eĉ malfermis dum sabata nokto - kiel manifestacio de la komunuma sento: "La urbo estas de Ni kaj ne de la Cosa Nostra" (venis pli ol 30.000 civitanoj por subteni tion). Aliaj celoj estas la integrado de eksterlandanoj - en Palermo jam bona tradicio, ĉar unu el la urbaj sanktuloj venis el Afriko; kaj ĉefe la redukto de la diferenco inter malriĉuloj kaj

riĉuloj. Por subteni tian civitanan politikon Palermo ricevis monon de la Eŭropa Unio.
Grava sukceso estas la partopreno de la Verduloj en la registaro enkadre de la balot-ligo "Olivujo".
Poste diskutis svedo (?) kaj sviso (*Lucius Teiler*) - li opiniis, ke ankaŭ la Verduloj ne estas ĉiopovaj; kaj la flankefiko de la malpli centralizata administracio signifus malpli da demokrata influo.
Ni akceptis per aklamado la peton de *Sam Jordan* el Washington D.C., la ĉefurbo de Usono, subteni la penon por ekhavi la normalajn civitanajn rajtojn kaj demokratan urban administracion.
Posttagmeze estis kvar laborstaĝoj:
La rolo de la urboj en Eŭropo. Maastricht kaj la financa krizo de la urboj. Verdaj konsilistoj en malgrandaj urboj kaj vilaĝoj. Verda reto de eŭropaj urboj.

**1-a Kongreso de Europa Federacio de Verduloj en Vieno en la UN-centro (1996-06-21/23):**

Ĝi komencis per Merkato de Verdaj Eblecoj je la rando de la kafejo. Estis budoj de diversaj verdaj partioj, de la Verda Frakcio de la Eŭropa Parlamento, de la Federacio de la Eŭropaj Junaj Verduloj kaj de la Asocio de Verduloj Esperantistaj.
La unua renkontiĝo de eŭropaj verduloj okazis jam 1984 - kaj samtempe AVE estis fondita.
Tiaj kongresoj donas eblecon ne nur por fari rezoluciojn, sed same grava estas la persona renkontiĝo kun verduloj el aliaj landoj.
La **kongres-lingvo** estis la angla; interpretado por la plena kunsido estis en la angla, franca, germana, itala kaj rusa. Plejmulto de la parolantoj uzis sian nacian lingvon; kaj en la laborgrupoj kaj en la kafejo kelkfoje estis problemoj, ĉar ne ĉiuj parolis la anglan. Kompreneble plejmulto havas aliajn patrinajn lingvojn. Feliĉe la afrikanoj parolis aŭ la francan aŭ la anglan.

Nun estas 28 verdaj partioj el 25 europaj landoj membroj de la federacio. En kromaj 7 landoj estas aliĝo-partioj, dum 4 aliaj ankoraŭ ne havas statuson. Bedaŭrinde en Pollando ne ekzistas verda partio; almenaŭ ekzistas verda movado.
Mi kiel sekretario de AVE ĝojis, ke observanto de hungara asocio AERA, *Andrasz Lukacs*, parolis Esperanton kaj ni do povis montri la taŭgecon de E-o.
Du aliaj kongresanoj iam lernis E-on. Estis paroloj de prominentuloj:
*Claudia Roth* (germana MEP), *Johannes Voggenhuber* (aŭstria MEP), *Joschka Fischer* (germana MB), *Nino Chkobadze* (georgia medio-ministrino) kaj *Edo Ronchi* (itala medio-ministro).
*Claudia* tre bone esprimis niajn internaciajn sukcesojn: "Kiu estus pensinte antaŭ tri jaroj, okaze de la Konsilo de la EFGP, ke parolos al ni verdulino el Georgio estante medio-ministrino kaj eĉ en la rusa."

Ŝi bone priskribis nian vojon de partio de protestuloj pere de reforma al konstrua partio kaj diris: "Ĉernobyl kaj BSE (bovina spongiforma encefalito) apartenas al la sama erar-vojo."

*Johannes Voggenhuber* admonis nin pli flegi la eŭropan spiriton ene de la verda movado; ne venku la interesoj super la ideoj.
El svedio venis juna verdulino *Yvonne Ruwaida* (german-palestin-devena); ŝi montris al ni, ke la humanecaj organizoj iel kreas humanismo-koloniismon. Aliaj el *Kamerun, Zairio, Sudafriko kaj Palestino* parolis pri iliaj spertoj. Gast-donaco el Zairio estis tre aludema: afrikanino kiu balancas surkape korbon plenplene de civilaĵoj: aŭtomobilo, fridujo ktp. .
El Usono venis verduloj, kiuj nun subtenas kandidatecon de *Ralph Nader* por prezidenteco; *Sam Jordan* petis subtenon por ke lia urbo Washington D.C., registara urbo de Usono, ricevu la plenajn civilajn kaj demokratajn rajtojn. Salut-vortoj eĉ venis de la verduloj el *Tajwan*. Pliaj prominentuloj alparolis nin: *Pekka Sauri kaj Nikki Kortvelyessy* (geparolantoj de EFGP); *Heidi Hautala* (Finnlando, MEP), *F-O Wolf ,Elisabeth Schroedter* (Germanio, MEP), *Gila Altmann, Albert Statz kaj Christian Sterzing* krome *Juergen Trittin* (Germanio, MB, respektive parolanto de verduloj).
Pliaj temoj: la **eko-impostoj**; ekz-e Anglio prenas imposton de la privata uzado de energio de 17,5 procentoj; belgoj pensas pri imposto al la fluo de informoj; **Mochovce** estis alparolita kiel pordo-malfermilo por pliaj atomcentraloj; **Arbarigo** en Katalunio montrata de *Josep Lluis Freijo*; la **IGC** (Interregistara Konferenco de EU = Maastricht II); **Nordo&Sudo**; obstakloj al **NRO**-oj en landoj kiel Estonio kaj Slovakio; eksporto de **venenaĵoj** al Georgio; **betono** kiel problemo por la kulturo de konstruado.
15 temoj estis rezoluciitaj. Finfine ni spertis alternativan urbo-rigardon, kio montris al ni la historion de la evoluo de Vieno. Entute estis bona sperto.
Bedaŭrinde la oficialaj verduloj ankoraŭ ne tro ŝatas Esperanton, kvankam *Germain Pirlot* montris, ke inter la EU-parlamentanoj la verduloj havas la plej altan procentaĵon da "Esperanto-simpatiantoj".

Okaze de la laborsesio de la Verda Frakcio en la Eŭropa Parlamento en Freiburg (1996-09-12) mi havis la eblecon denove montri AVE-n kaj Esperanton enkadre de "Merkato de la Verdaj Eblecoj" kune kun 10 aliaj pli regionaj NRO-j . Dank al helpo de pluraj membroj de la *Freiburg-a Esperanto-grupo kaj Frank Stocker*, prezidanto de GEA, ni povis bone diskuti en diversaj lingvoj kaj disdoni informilojn al multaj vizitantoj. Tre interesa estis la diskuto kun la interpretistoj: ni povis montri la literaturon de E-o; bone akceptita de la anglaj interpretistoj estis la recitado de poemo "La Tigro" de William Blake el la Angla Antologio.
Bedaŭrinde la alirvojo ne gvidis la partoprenantojn de la seminario rekte al la merkato, tial venis nur 2 MEP-anoj al la merkato: *Inger Schoerling* el Svedio (ŝi iomete favoras E-on, kaj pensis pri uzebleco je ŝia vizito en Estonio) kaj *Frieder-Otto Wolff* el Germanio (li konas E-on jam de sia junaĝo, sed ne kredas ke E-o havos sukceson). Alitage mi mem havis eblecon de pluraj interparoloj al MEP-oj kaj iliaj kunlaborantoj: *Nuala Ahern* el Irlando kaj *Wilfried Telkaemper* el Germanio (ili kontraŭas E-on). *Wolfgang Kreissl-Doerfler* (MEP), laŭ informo de Frank Stocker, subtenas

E-on. Mi opinias, ke estis jam sukcesa prezenti sin - kaj diskuti kun la kontraŭuloj.
La lingva problemo en la Eŭropa Unio certe kreskos ĝis neeltenebla grando, kiam membriĝas la mez- kaj orient-eŭropaj landoj. Tiam ne plu eblas plidaŭrigi laŭ la nuna maniero; simple pro la eksplodo de la nombro de bezonataj interpretistoj. Mi vidas du vojojn:

- uzi la anglan kiel ĉefan lingvon (same kiel en la Eŭropa Konsilio, kie la franca ankaŭ validas); tiam la "native speakers" havus grandajn avantaĝojn; aŭ
- uzi Esperanton kiel pontolingvon - ĉiu EU-parlamentano kaj kunlaboranto devas havi pasivan scion de Esperanto - kaj la EU-organizo organizas la tradukon el ĉiuj naciaj lingvoj en Esperanton.

Jam nun okazas, se en komitato sen interpretistoj plejmulto komprenas la anglan, oni plie tradukas ekz-e por la latinidaj lingvoj en la francan.
Do, por ni restas la revo, ke Esperanto, kiu estis kreita ĵus por la internacia interkompreniĝo, iam ludos tiun ĉi rolon.

Malarmado: Grundminoj / Eurofighter

Eĉ en renomaj sciencaj ĵurnaloj, kiel "Spektrum der Wissenschaft" estis kondamnita la sentaŭga decido de la rezulto de UN-konferenco pri grundminoj. Plidaŭras la helpado de vunditoj, la serĉado kaj detruado de grund-minoj kie milito jam delonge forestas; kaj plidaŭras la konstruado, produktado kaj dismetado de grundminoj kaj aliaj tipoj de minoj.
Unu de tiuj aliaj nomiĝas PARM (Panzer-Abwehr-Richt-Mine, t.e. aŭtomata armilo kontraŭ tankoj) kiun produktas Daimler-Benz (DB). La germanaj pacemaj grupoj nun faras kampanjon kontraŭ DB, kiu ja estas konata kiel produktanto de luksaj aŭtomobiloj. PARM estas aŭtomata armilo, kiu ne distingas inter paca aŭ malpaca veturlio; krome ĝi estas sekurigita per ĉirkaŭantaj minoj kontraŭ homoj (kiujn la produktantoj nomiĝas: Molaj Celoj !).
*Wilfried Telkämper*, MEP de Verduloj, kaj *Otfried Nassauer* (Informocentro por Transatlantika Sekureco, Berlino) postulas kompletan malpermeson de ĉiaj minoj; alimaniere la lobio subfosos la kontraktojn kun rezulto de senvaloreco.
Alia kampanjo estas kontraŭ la "Eurofighter" (EF) - nun planata eŭropa militaviadilo. Kunlaboras pliaj eŭropaj ŝtatoj por produkti ĝin. La germana NRO, Armil-Informa Oficejo (AIO, germane RIB), eldonis 8-punktan informilon:
1-e: La projekto EF apartenas al la Malvarma Milito.
2-e: EF servos por agresema ekstera politiko. Ĝi malhelpas nemilitan preventadon de militoj. La eksporto en regionojn kie regas malpaco, ne gvidos al paco.
3-e: La povo de la EF egalas al MIG-29; el kiuj en Germanio restis 24. Ili sufiĉus por defendi Germanion. Kaj oni eĉ povus aĉeti ilin en Rusio.
4-e: La argumentado, ke inventoj el la produktado de militaviadiloj ankaŭ servos por civila uzado, estas malforta.
5-e: La antaŭdiritaj kostoj (14 mrd-oj da gmk-oj) ne validas; ĝi kostos pli (verŝajne 30 mrd-ojn).
6-e: Investado de la postulita sumo en novajn civilajn produktojn - kiel logistiko de la (publika) trafiko, uzado de regajneblaj energi-fontoj, socialaj kampoj) - provizus pli da laborlokoj kaj gvidus al plia stabileco.
7-e: Konstruado de EF malhelpus la konversion al civilaj produktoj el tiu ĉi industrioj.
8-e: La kostoj de la haltigo de la EF-projekto ne kostus punmono, ĉar ne ekzistas ĉirilataj kontraktoj.

Kvankam unue temas pri eŭropa projekto, tamen ĝi afliktus la tutan mondon - pro la eksporto kaj pro la foruzado de resursoj (metaloj kaj energio) ĝi malhelpus la civilan evoluadon sur la tero. Se vi loĝas en okcidenta Eŭropo, bonvolu demandi pacemajn grupojn en via lando pri tiu ĝi projekto.

Agado de AVE:

Aral Mara Regiono: (vidu ĉe 'Prag') mi intencas veturi tien '97 post Eŭro-Azia Kongreso (97-08-09/17).

Aleutaj Insuloj / Bering-maro: En la WWF-ĵurnalo "Arctic Bulletin" N-o 3,(1996) estis ampleksa artikolo pri la endanĝerigata biodiverseco. WWF signifas Fonduso por Tutmondaj Sovaĝ-bestoj.

BSE: *Alan Gould*, Britio, verkis artikolon pri la fono de BSE (bovina spongiforma encefalito); do, pri la uzado de kadavroj kiel nutraĵo por bovoj - kiuj estas vegetaranoj; (Sennaciulo 1996, N-o. 7)

Bestaj Rajtoj - Alvoko: Karaj geamikoj, en tiu ĉi jaro okazos la tielnomata InterRegistara Konferenco de Eŭropa Unio, IRK (angle: IGC = InterGovernmental Conference) sur eŭropa nivelo - pli precize Mastriĥto II. La IRK devos adapti la Traktatojn de Mastriĥt al la ŝanĝiĝita situacio post la aliĝo de Aŭstrio, Finlando kaj Svedio. Tio ĉi estas ŝanco enkonduki la temon de Bestaj Rajtoj sur eŭropa nivelo. Rilate al EU devus temi ekz-e pri:
- **tenado de brutoj**, ĉar pro ekonomiaj kaŭzoj bruto ofte estas tenata en kruelaj, ne konvenaj, do maldignaj, cirkonstancoj (kokoj, bovidoj,..);
- **transportado de vivantaj bestoj** dum pluraj tagoj sen nutrado kaj en nekonvenaj ejoj (ekz-e buĉotaj bovoj de eŭropaj landoj al arabaj landoj, simple pro tio, ĉar ili volas buĉi la bestojn laŭ koŝera metodo (ŝakti ?).
*Ute Haas*, el la bestrajta grupo de AVE petas vin: bonvolu sin direkti plej baldaŭ al la kompetenta ofico en via lando (Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj) kaj apelacii, ke ili pledu por la enkonduko de la best-protektado kaj de la Bestaj Rajtoj en la Traktatojn de Mastriĥt. Ute Haas, Chamisso Str. 7, DE-40237 DÜsseldorf.

---

Asocio de Verduloj Esperantistaj
UEA-konto (por donacoj): avex-z
Sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62, DE-79194 GUNDELFINGEN
e-poŝto:M.Westermayer@3Landbox.comlink.apc.org
hejma paĝo: http://www.comlink.apc.org/ave